# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 03/03/2022 Kvincentsepdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/


**Uzindaj ligoj** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 766,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **193,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **174,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

Nun oni ne devas surporti vizaĝmaskon en Aŭstralio. Ĉu la venontaj registaraj voĉdonoj estas pli gravaj ol la sano de la popolo? *Roger Springer*



la [esperanta retradio](#)

**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon. 28-2-2022**



11 JAROJ DA OPTIMISMA AGADO



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 5a de marto estos la unua sabato Venu! *Roger Springer*

## BookBox

https://www.youtube.com/watch?v=GRYS7QYpbRI




Karaj,
Post iom longa paŭzo mi ree tradukis rakonton por BookBox. Jen la rezulto: La rivero kaj la monto

Amike, *Nicole Else*



## La militaj industrioj ĝojas.



La sango kaj mono ŝajne ree fluos.

La loĝantoj ne gravas.

Kaj oni forgesas la fuŝajn problemojn kiujn viaj politikistoj kreis por via lando ĉar nun vi havas komunjan novajn malamikojn por malami.



Kontraŭaj novaĵoj ĉe
*https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html*

kaj por la historio de la situacio https://www.greanvillepost.com/ *Roger Springer*

2a el 5 paĝoj AŬSTRALIAJ ESPERANTISTOJ Esperanto 世界语 03/03/22 AE 572



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).**

**Numero 4 de "Por Progresantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Ekzistas du specoj de predikativo. Klarigu kun ekzemploj kiel la du specoj diferencas.

2). La subjekto kaj la objekto kaj la adjekto povas kunhavi unu el tri specoj de suplemento. Diru, kiu speco devas enhavi verbon, kaj diru ankaŭ, ĉu tia verbo povas ĉehavi siajn proprajn gramatikajn objekton kaj adjekton.

3). Se la Esperanta frazo konsistas el nur subjekto kaj predikato, ĉu la frazo estas plena frazo?

4). Kiu parto de aglutina kunmetaĵo estas la ĉefelemento?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 572.

*Marcel Leereveld.*

# El Brizbano






Ni nuligis nia dimanĉan kunvenon ĉar pluveg-katastrofo vizitis sud-orientan Kvinslandon. BES sekretario, Petro, de " *Kabultur* " fotografis inundon antaŭ sia domo. Normale oni vidas ABSOLUTE NENION de la loka malproksima rivero.

Fotoj de lia enveturejo kaj de la hunda- herbejo kaj arbejo *Petro Danzer*



# Usonaj Biolaboratorioj en ukrainujo




[Is there more to the Ukraine/Russia conflict than meets the eye? – The Expose (dailyexpose.uk)](https://dailyexpose.uk)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). Ili estas la subjekta kaj la objekta predikativoj. Ili referencas AŬ all la enhavo de la subjekto, kiel en "Ŝi aspektas LACA", AŬ al la gramatika objekto, kiel en "Ŝi juĝas lin KULPA". (Nepredikativaj predikatoj estus "Ŝi lacaspektas" kaj "Ŝi kulpjuĝas lin").

2). Nur suborda frazo devas enhavi verbon. Tia verbo povas ĉehavi siajn objekton kaj adjektojn.

3). Jes, ĉar frazo devas enhavi almenaŭ subjekton kaj predikaton.

4). La lasta parto.

*Marcel Leereveld.*

Ju pli socio malproksimiĝos de la vero, des pli ĝi malamos tiujn, kiuj parolas ĝin."

*Selwyn Duke*



**Iu atakas mian komputeron** dum serĉado sur la reto.

Subite panika voĉo kriis, Ne fermu, Ne fermu, Ne fermu, via komputero estas ŝlosita, kontaktu min, ne fermu, ne fermu, kontaktu min.

Do mi rapide malŝaltis la elektron al komputero.

Kiam post kelkaj minutoj, mi reŝaltis la komputeron, mi trovis ke mi perdis horojn da laboro en la novaĵletero sed la viruso ne havis sufice da tempo por infekti la komputilon. *Roger Springer*

## Putin



Ĉu mi kredas, ke Putin ne provis venen-murdi rivalon, antaŭ ol enkarcerigi lin kaj deklari lin teruristo?

La Sovetunio disfalis antaŭ iom pli ol tridek jaroj. Ĉu mi kredas, ke amikoj de Putin povis iĝi riĉriĉuloj en tiuj tridek jaroj bonkondute kaj honeste?

Ĉu mi volas, ke tiaj homoj estu arkitektoj de nova Eŭropo?

Ne. *Margaret Furness, Adelajdo*

**AE estas kontraŭ milito.** Mi kompatas la homojn kies domoj kaj vivoj estas detruitaj. Ni malamas la propagandajn mediojn kiuj nur donas unu flankon de la situacio por ke homoj libervole, mortigu aliulojn aŭ detruu iliajn domojn kaj vivstilojn.



Zorgu, ne kredu iun novaĵon sen rigardi la historion, la kontraŭon kaj sen demandi kiuj riĉiĝas el la situacio.

La mondo sendis multmilionojn da armiloj al tiu Ukrainio sen pensi pri la domoj, vivoj, ktp detruotaj sed ne mono al afganoj de kiu Usono ŝtelis milionojn.



Brazila foto

Ĉu ĉi tiuj ordinaraj homoj vidos la homojn brulantajn post uzo de tiuj simplaj armiloj ? *R. Springer*

## Ĉu la banksistemo estas sekura?

Nun parlamentoj en kelkaj landoj (Usono, Kanado, ktp,) malpermesas la eltiron de mono el ies bankoj por puni landon aŭ homon kaj ŝtelas monon de la klientoj por si mem. *R Springer*



**3ZZZ** … En la elsendo de la 28a de februaro 2022 estas anonco pri la rekono de la irlanda lingvo en la Eŭropa Unio , legendo pri la mildiga vento, kiu blovas al grekaj insuloj kaj humurplena rakonto pri la teranoj kiuj rifuzas la donacon de Dio : forigi ĉiujn malsanojn … *Franciska Toubale*